


# Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

***JARABONO*** :

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AUGUSTO

1975 3-4

# KULTURAJ KAJEROJ

1975

MAJO - JUNIO - JULIO - AUGUSTO

## Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

**Komitatanoj :**

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

## ENHAVO

**El Grésillon**

**Esperanto tra la mondo** A. Frangeul

**Laŭlonge de la Loire-valo**

**Socio-ludoj en la antikva Egiptujo**

**La ventmuelejoj en Nederlando** M. de Waard

**Maltrankviloj de biologo**

**Mezepokaj ŝildoj**

**Por via distro**

**Kverelo ĉe la lago** P. Balkanyi

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

# El Grésillon

Jam plurfoje, ek de la Paskaj ferioj, la kastelo malfermis siajn okulojn kaj, ĉiufoje, al pli densa foliaro. Nun la parko surmetis la vestaĵojn, kiujn ĝi surhavos dum la tuta somero, kiam ĝi estos vizitata de gesamideanoj.

Ŝajnas, ke ĝi estos pli vizitata ol pasintjare. Jam aliĝis kontentiga nombro da partoprenontoj por julio, malpli granda por la dua kaj la tria periodoj. Sed ĉiutage alvenas novaj informpetoj. La bilanco de la somero estos pli bona ol la lasta ... kondiĉe ke la prezoj restu saĝaj.

Por la unua periodo ni spertas malfacilaĵojn por kontentigi ĉiujn aliĝantojn ĉar, pli kaj pli petataj estas la unulitajn kaj dulitajn ĉambrojn. Novaj aranĝoj estos necesaj venontjare. La programo estos verŝajne tiel sukcesa, kiel kutime ĉefe pro la ĉeesto de almenaŭ dekkvino da eksterlandanoj.

Kompreneble, dum la dua periodo la nombro da eksterlandanoj estos pli granda. La prelegoj estos tre diversaj : « La virino kaj la maŝino », « Plena reguleco de Esperanto », « Islamo », « Kia krizo trafas nun la teran mondon ? », ktp. La posttagmezaj diskutoj estos certe tre interesaj.

Por la tria periodo la aliĝoj kutime alvenas ĉefe dum junio kaj julio. La nombro da jam aliĝintaj geamikoj estas jam kuraĝiga. La partopreno estos certe almenaŭ tiel granda kiel kutime.

La seĝoj aĉetitaj dank'al la speciala fonduso kreita de la ĉeestantoj lastan someron ebligos la utiligon de la prelegsalono. Sed la muroj ankoraŭ ne estas tapetitaj ĉar ni ne povis fari iun ajn plian aranĝon. La loko estos tamen uzebla.

Ĝis baldaŭ, al multaj el vi, kiuj vizitos nin dum la somero.

## S-RO VEROT ESTAS NAŬDEKJARA

La Esperantista klubo de Saint-Etienne festis la naŭdekan naskiĝdatrevenon de nia samideano Vérot.

Dum pli ol kvindek jaroj, li fervore laboris por Esperanto. Li estis akciulo de la Esperantista Kulturdomo ek de la unuaj momentoj. Li daŭre aktivas en la esperantista movado kaj eĉ ĉeestis la nacian kongreson en Tours.

Ni gratulas lin, kaj deziras multnombrajn aliajn naskiĝdatrevenajn festojn.

# Esperanto tra la Mondo ★

## LA ESTONTAJ UNIVERSALAJ KONGRESOJ

En 1976, en Ateno, de la 31a de Julio ĝis la 7a de Aŭgusto ; en 1977, en Reykjavik (Islando), de la 30a de Julio ĝis la 6a de Aŭgusto.

## LEĜA PROPONO EN FRANCIO

En la franca nacia asembleo, la grupo de la socialistoj kaj de la maldekstraj radikaluloj deponis leĝan proponon por ke Esperanto estu akceptita kiel fakultativa lingvo por la ekzamenoj de la duagrada instruado.

## RILATOJ INTER LA LINGVOJ DE LA ETNAJ MINORITAJ KAJ ESPERANTO

Pri tiu temo, la komisiono por eksteraj rilatoj de T.E.J.O. (Kastalenstraat 231, Amsterdamo 2, Nederlando) povas sendi tekston en pluraj ekzempleroj, ĉu en Esperanto, ĉu en franca, k.t.p..., por la interesatoj.

Dum la somero, T.E.J.O. organizas seminariojn (ĉefe por ne-esperantistoj). Unu en Coimbra (14 - 20 de Septembro) pri la rolo de lingvo kaj kulturo en la politika premado ; en Fredericia (Danio) pri la temo « Lingvo kaj dekoloniigo » (19 - 26a de Julio).

## ĈU VI KONAS LA REVUON « HOMO KAJ KOSMO » ?

Se vi interesiĝas pri sciencaj, interalie astronomiaj artikoloj kaj pri novaĵoj de la « somerumejo » de Primoŝten, ne forgesu aboni la trimonatan revuon « Homo kaj Kosmo », eldonitan en Jugoslavio.

## LASTAJ ELDONAĴOJ

— « Mia vivo », aŭtobiografia libro de N. Bartelmes, la konata sekretario de S.A.T.

— « La dekopo de Afke », tradukita romano de la frisa verkistino de N. van Hichtum.

— « Ni devas vivi », poemaro de K. Walraamoen kaj Lina Gabrielli.

— « Interesa arkeologio », popularscienca priskribo de kelkaj arkeologiaj lokoj, de M. Ĝivoje.

— Diversaj tekstoj de prelegoj de D-ro Kawamura, pri kemiaj temoj, en Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo.

## DECIDO DE LA SOVETA AKADEMIO PRI SCIENCOJ

En Oktobro 1973, la prezidio de la Soveta Akademio pri Sciencoj decidis ke la sekcio « literaturo kaj lingvo » de la lingvistika instituto esploru la problemon de helplingvo por la internacia trafiko kaj ĝiaj aplikoj sub la nunaj kondiĉoj.

Sekve de tiu decido, oni fondis en Majo 1974 problemgrupon por la demando de helplingvo direktita de D-ro Isajev.

## EN AMERIKO

— Modernlingva Asocio de Usono, ankaŭ en 1975, aranĝos dum sia kongreso en San Francisko (27 - 30a de Decembro) du seminariojn : Unu pri esperantaj lingvo kaj literaturo, ĉirkaŭ la temo : « La originala esperanta literaturo » ; alia pri interlingvistiko, titolita : « Kiel difini interlingvistikon ? ».

— En Suda Ameriko (Argentino kaj Brazilo), ekzistas jam 54 stratoj kaj placoj nomitaj « Esperanto » aŭ « D-ro Zamenhof ».

— S-ro Fleming, el Chicago, fariĝis speciala komisiito de U.E.A. pri kampanjo kies celo estas pligrandigi la ekzistantajn kaj instigi la kreon de novaj kolektoj de la esperanta literaturo en grandaj bibliotekoj de Usono.

## SCIENCAJ VESPEROJ EN BUDAPEŜTO

La esperanto-klubo « Konkordo » en Budapeŝto organizas regule sciencajn vesperojn. Okaze de la sesa datreveno de la fondiĝo, la medicina grupo aranĝis sciencan kunvenon kun riĉa programo de prelegoj.

## LINGVISTIKA SIMPOZIO EN ZAGREB...

En Kumrovec, proksime de Zagreb, okazis de la 4a ĝis la 6a de Aprilo, Internacia Lingvistika Simpozio en kiu prelegis lingvistoj, komputistoj kaj tradukistoj el kvin landoj. La ĉeftemo estis : « Esperanto kiel lingvistika bazo de universala gramatiko kaj de meta-lingvo kaj kiel universala lingva fenomeno ». La organizanto estis la Internacia Kultura Servo de Zagreb ; la aŭspicianto T.E.J.O. kaj la simpozio estis financitaj de la Respublika Konsilantaro por Scienca Laboro.

## ... KAJ SEMINARIO EN ITALIO

En Romo, dum Aprilo, estis aranĝita « Seminario pri lingvoplanado, tekniko kaj politiko », kun partopreno de sesdeko da universitataj profesoroj pri lingvistiko kaj studentoj (75 % ne-esperantistoj).

## MODERNA GAZETKURSO

Arnhema Esperanto-komitato, en Septembro, lanĉos modernan esperanto-kurson en « Arnhemse Koerier » kaj ĝiaj frataj gazetoj en Zutphen kaj Zwolle. Tiuj nederlandaj gazetoj estas ĉiu-semajne senpage disdonitaj al ĉiuj loĝantoj.

## AVIADILO « L. ZAMENHOF »

La pola flugkompanio Lot, kiu jam plurfoje montris sian favoran sintenon al la internacia lingvo, donis la nomon « L. Zamenhof » al unu el siaj aviadiloj TU 134... Gratulu Lot, ul. Grojecka 17, Warszawa, Pollando.

## POR LA FILOLOGOJ

La Internacia Unuiĝo de la Esperantistaj Filologoj registris 130 membrojn el ĉiuj kontinentoj. La asocio aperigis novan bultenon « Filologio », ĉe bulgara Esperanto-Asocio, pk. 66, Sofia, Bulgario.

## INTERNACIA JARO DE LA VIRINO

U.E.A. organizis komitaton por plani kaj direkti la kontribuon de la Asocio al la Internacia Virina Jaro. La ĉefa temo de la 60a universala kongreso estos la socia rolo de la virino ; kaj estos ankaŭ partopreno al la Virina Jaro je nacia kaj loka niveloj. Du U.E.A.-delegitoj reprezentos la movadon en la Tutmonda Konferenco de U.N.O. en Meksiko, dum Julio.

## « LA 26 HOROJ DE ESPERANTO » EN ANGERS

Ni jam anoncis tiun manifestacion (25 - 26 an de Oktobro, en Angers Francio). Estos aranĝitaj paroladoj kaj debatoj pri diversaj temoj, kaj junulara renkonto. La eksterlandanoj kiuj povos veni estos bonvenaj. Adreso : S-ino Cheverry, résidence Dupetit-Thouars, Chemin d'Epluchard, 49000 Angers.

## KIAM LA MARIONETOJ PAROLAS EN ESPERANTO

— Profesia bulgara pupteatro de Plovdiv (Bulgario), prezentis « la scivola elefantido » laŭ fabelo de Kippling en pluraj lokoj de Danlando en Esperanto kaj parta traduko en la dana.

— Marioneta trupo de Niŝ (Jugoslavio) prezentis « La lernejo de la leporidoj » esperantlingve en italaj lernejoj de 5 urboj.


# Laùlonge de Loire-valo

Reĝoj, feŭduloj, ekleziaj ordenoj akumulis belajojn kaj riĉajojn en tiu « Ĝardeno de Francio ». Chambord, Blois, Chenonceaux estas multe vizitataj. Tamen malantaŭ arboj-kurtenoj kaŝiĝas aliaj vizitindaj kasteloj.

Je 10 km. okcidente de Chambord, la kastelo Beauregard, perdita en la biena arbaro Russy, starigas Renesancan silueton, kvietigitan de la XVII-a klasikismo, kiu transformis la kastelon. Du ĉambroj, sendube unikaj en la mondo, kaptas nian intereson. Longa galerio entenas 363 portretojn historiajn de reĝoj, reĝinoj, nobeloj, princoj el Eŭropo kaj Oriento ; ili najbariĝas kun famuloj, kiel Savonarole kaj Pic de la Mirandole. Tiuj pentraĵoj, kiuj tute kovras la murojn, estas vera kroniko de la politika kaj filozofia vivo de la okcidentaj landoj, de Philippe de Valois ĝis Louis XIII.

La planko, konstituita el miloj da malnovaj « Delft » prezentas irantan armeon en la tempo de Louis XIII : kavalerianoj, infanterianoj, musketistoj, tamburistoj, laŭ perfekta ordo, defilas sub plafono riĉe dekoraciita je flavaj, bluaj, blankaj arabeskoj, kronoj kaj stilizitaj floroj, kiuj interplektiĝas.

La dua ĉambro estas malgrandega labor-kabineto, dirita « Kabineto de Grelots » ; ĝi estas tute panelita el kverkaĵo skulptita kaj origita, sub belega



plafono kun kasonoj el la 16-a jarcento. La vizito finiĝas en la kuirejo de la kastelo, grandega ĉambro ekipita kiel sub François I^er^.

Trairinte la arbaron Russy, laŭ la Beuvron-rivero, oni malkovras la kastelon Chaumont ; ĝiaj rimarkindaj proporcioj forte impresas nin ; ĝi superstaras Loiron, ĉe supro de parko, kiu entenas centjarajn cedrojn. La ekstera fasado milit-kaj-sovaĝaspekta, flankita je pintaj turoj kaj impresa rondirvojo malfermiĝas sur levoponto. Estas la tuta, robusta, mezepoka forteco, kiu orgojle stariĝis sur la vojo de la invadoj kaj pilgrimadoj. Post trapaso de la levoponto, jen ĉarma interna korto ; ĝi estas teraso el kiu oni malkovras la vastegan Loire-pejzaĝon. Tute ĉirkaŭe la aloj, profunde transformitaj de la balbutanta Renesanco, anoncas la ĉarmecon kaj la vivo-dolĉecon de la tiutempa italismo. La kontrasto kun la rigoro de la eksteraj fasadoj estas emociiga, kaj permesas legi, gravurita kaj skulptita en la ŝtono, la evoluadon de la arkitektaj stiloj. La interno de la kastelo estas meblita. La ĉambroj de Catherine de Medicis kaj de Ruggieri, ŝia astrologo, ankoraŭ enhavas litojn kun baldakeno, kovritaj je belegaj drapiraĵoj verdaj, blankaj, viol-kaj-or-koloraj.

La kastelo Gué-Péan estas tiel malproksima de la grandaj aksoj, ke la Vikingoj, malgraŭ ilia flaro por trovi luksegajn predojn, ĝin ne malkovris. Starigita meze de arbaro Choussy, tiu antikva mezepoka fortreso, transformita de Louis XII, Louis XIII kaj Louis XIV, estas hodiaŭ « ĉefverko en danĝero ». Forlasita, paŭtita, tiu alloga kastelo malfermiĝas sur internaj fasadoj, kiuj atestas 4-jarcentan evoluadon de la arkitekturo. La belegaj « laŭfrancaj » tegmentoj, kiuj kronas la kastelon estas malfacile kaj koste ripareblaj (ĉiu enirbileto pagas unu ardezon). La kunmetado de ĝiaj dikaj mezepokaj turoj kun la elegantaj arkadoj, kiuj leĝerigas la alojn kaj la pavilonojn donas impreson de emociiga fragileco. Unue bieno de kelkaj brutalaj militestroj, kiuj solvis ĉion per arbelato-bato, peze albatita, ĝi iĝis laŭlonge de la jarcentoj galanta malliberejo. Oni ankoraŭ montras, en unu el la malnovaj turoj, la ĉambron de la viraj kaptitoj, kiujn impetega grafino enfermis por ke ili konsentu homaĝi al ŝia Mŝtino, kun la tuta sindonemo, kiun vasalo devas al sia feŭdomastrino.

Pli sude, trairinte la riveron Cher, la vojaĝanto malkovras alian mirindaĵon ; sur la bordoj de Indre-rivero jen la mezepoka urbo Loches ; laŭ zigzagaj stratetoj oni supreniras en la malnova urbo, superstarigita de la propre dirita mezepoka civito. En tiu ĉi civito, ĉirkaŭita de fortikaj remparoj la preĝejo Sto Urso siluetigas sur la ĉielo sian strangan tegmentaron kun du turoj kaj du okangulaj piramidoj.

Kontraŭe, sur ĝardeno-teraso, kiu superstaras la urbon, la reĝa kastelo, gardata de sidantaj hundoj el ŝtono, ŝirmas la tombon de la bela Agnès Sorel. Tiu kastelo finkonstruita de Charles VII kaj Louis XII ŝajnas Renesanca juvelo lokita meze de la mezepoka brutaleco. Je kelkaj metroj de tiuj elegantaj skulptaĵoj staras la teruraj ĉefturoj starigitaj de timigaj altranguloj. Pri tiuj funebrecaj malliberejoj kaj karceroj, enprofundigitaj je 40 metroj sub tero, rakontis, je la 17-a jaro, la eksterordinara Foulques Nerra, grafo de Angers. Lia vivo estis nur longa batalo. Kvankam 70-jarulo, blankhara kaj aĝokaduka, sed ankoraŭ ebria je perforto kaj murdoj, li galopis de Angers ĝis Saumur, portanta la

feron kaj la fajron sur sia vojo. Louis XI ne donis pli bonan reputacion al Loches ; ĉi tie li instaligis siajn famajn « kaĝojn ». La milita potenco de tiuj monstraj remparoj naskas angoron.

Forlasante Loches, oni povas viziti la « Pagodon de Chanteloup », kiun konstruigis Choiseul, ministro de Louis XV. Alta je 44 metroj, tiu stranga konstruaĵo memorigas la admiron, kiun la 17-a jarcento portis al Ekstrem-Oriento.

Laŭirante la Loire-valon, ĝis Rigny-Ussé, estas precipe la malgranda bieno-domo Clos-Lucé, kiu kaptas nian intereson. Je kelkaj centmetroj de la belega Amboise-kastelo, tiu nobel-domo, donacita de François-Ier al Leonardo de Vinci, ekspozicias la skizojn de kelkaj el la kreaĵoj de tiu geniulo de la Renesanco. La admirantoj de la pentristo kaj skulptisto malkovros ĉi tie la inĝenieron, la scienculon, la milito-viron, la hidrografon, kiu estis Leonardo. Je la 16-a jarcento, li estis jam inventinta la unuan du-lokan aŭtomobilon, movigitan per risortsistemo. Apud tiu trirada monstro, jen la unua sturmo-ĉaro : konusa kiras-tureto muntita sur radoj, kun truoj ĉe sia bazo por pasigi la buŝegon de la kanonoj, kaj permane manovrita helpe de multaj endentaĵoj. Iom pli malproksime, jen turneblaj pontoj, unuaj mitraloj, la unua paraŝuto, la unua helikoptero, la unua universala ŝraŭbŝlosilo, la unua kilometra komputilo, la unua aparato por kondiĉita aero : jen la tuta produktaĵo de unu el la plej grandaj cerboj el ĉiuj tempoj.

(En sia « Parolado pri Neebleco de mekanikaj flugadoj », redaktita en 1613, Tito Ticinelli skribas : « Leonardo de Vinci intencas kredigi al ni, ke, kunigante amason da materialoj por formi ian aeran veturilon, la viro, kiu en ĝin instaliĝos, ne falos teren, sed ekflugos kaj ŝvebos. Mi ne estas speciale obstina, sed mi asertas, ke neniu leganto, spiritsana, akceptos la rezonadon de Leonardo ») (tio estis en 1613).

Post Tours la riverego, abundega, luksega, potence lekas la necertajn bordojn. Post la konfluejo kun Indre, la senhoma strato laŭsekvas la Loire-meandrojn, kaj, tra la kampoj, iras ĝis antaŭ la kastelo Rigny-Ussé ; ĝi estas la kastelo de la « Dormanta Belulino » de Ch. Perrault. Piede de Indre, apogita ĉe profunda arbaro, kiu ondas laŭ la montetoj, dolĉe bluetigita, ĝi siluetigas, sur la verdaj arboj, fantasmagorian tegmenton abunde ornamitan je gabloj, pinakloj kun hokoj, ŝtonaj festonoj, kaj skulptitaj kamenoj. Rondirvojo kovrita je ardezoj serpentumas sur la supro de masivaj muroj, superstarigitaj je turetoj kaj lukoj, kie regas flamstila gotiko kaj Renesanca pureco. Transpaŝante la jarcentojn, Rigny-Ussé najbarigis tumulton de artaj inspiroj ; ĝi elvokas samtempe emon al milito kaj



dolĉecon de la vivo. La eksteraj fasadoj, XV-jarcentaj, potence fortikigitaj, protektas korton Renesancan kaj gotikan, kie vidiĝas iom da klasikismo. Gracieco kaj severeco ĉi tie renkontiĝas. Anstataŭ mezepokaj ĉirkaŭfosaĵoj, teraso-ĝardeno, desegnita de Le Nôtre, montras multkolorajn flormasivojn kaj tricentjarajn oranĝarbojn. Parko el belegaj cedroj kondukas al alia teraso antaŭ la kastelo. La reĝa ĉambro estas tute tegita je ĉinaj silkaĵoj blankaj kaj ruĝaj ! or-kaj-blankaj kolonoj dekoraciitaj je akanto-folioj, subtenas la plafonon. La galerioj de la ter-etaĝo prezentas mirigajn kolektojn de kling-armiloj kaj fajro-armiloj el ĉiuj jarcentoj. Persaj kaj Saracenaj armaĵoj estas apud hindaj ponardoj kaj kortego-spadoj, kiujn portis la nobeloj de la 16-a kaj 17-a jarcentoj. Kun bedaŭro oni forlasas tiun fascinan kastelon, kiun la vastega arbaro de Chinon ŝajnas kaĵoli.

La vojaĝanto haltos ankaŭ en Langeais, la admirinda Langeais. Ankaŭ en Montsoreau, famigita de Aleksandro Dumas ; tiu ĉi entenas belegan gardoĉambron, kiun oni povas lui okaze de tag-aŭ-vespermanĝoj.

# Socio-ludoj en la antikva Egiptujo

Ĉiutempe la Egiptoj praktikis ludojn. La ludo estas konstanta temo, kiu ornamis jam la « mastabaoj » de la Malnova Imperio kaj ankaŭ la vivkolorajn freskojn en la Valo de la Reĝoj. La prifosaĵoj liveris al la arkeologoj diversajn modelojn de ludoj inter kiuj la plej popularaj estis la Ludo de la serpento « mehen » (praulo de la ansero-ludo), la Ludo de la hundo aŭ de la 30 poentoj (praulo de la triktrako) kaj la « Zenet ».

La ludo de la serpento mehen estas unu el la plej malnovaj ; la plej malnova ekzemplero konata (4.000 ant. K.) estis trovita en la neolitika vilaĝo Nagado ; ĝi estis tre laŭmoda sub la Malnova Imperio (2.800-2.300 ant. K.) ; ĝi malaperis en la postaj epokoj. La ludotablo estis disko, kiun kovris spiralvolvita serpento ; ĝia kapo estis en la centro ; ĝia vosto sur la ĉirkaŭaĵo kaj ĝia korpo estis partigita en ĉeloj sur kiuj antaŭeniris la peonoj. Tiuj ĉi, el eburo, reprezentis leonojn kaj leoninojn (5 peonoj por ĉiu ludanto). Sur la disko oni ruligis ruĝajn kaj blankajn globetojn, kiuj indikis la lokon de la peonoj. Sendube pli poste, ĵetkuboj anstataŭis la globetojn ; ĉar oni ne retrovis skribitajn regulojn, oni ne konas la irmanieron de la mehen-ludo.

Sinjoro P. Montet prezentis hipotezon pri ĝia origino. Laŭ li, la ĉaso inspiris tiun ludon.



En la neolitiko, la sovaĝaj bestoj vivis en la vepraĵoj, kiuj kreskis ambaŭflanke de la riverego Nilo. La Egiptoj de tiu malproksima periodo (inter la 8-a kaj la 5-a jarmilo) prilaboris skistajn tabuletojn sur kiuj staris leonoj, ĝirafoj kaj serpentoj ; en la centro estis kaveto ; tiu kaveto figuris la kaptilo-fosaĵon, en kiun falis la bestoj ; ĝi estis kovrita per leĝera hurdo sur kiun oni metis serpentokadavron kiel logaĵon.

Cetera en la Tekstoj de la Piramidoj, la vorto « mehen » estas uzata en la senco de « Kaptilofosaĵo ». La simbolo estas klara : la ludanto prenis peonojn sur la korpo de serpento. Kvankam la irado estis longa de la neolitikaj ĉasistoj ĝis ni, la ludo postvivis ĝis nia XX-a jarcento sub la nomo de « ansero-ludo ».

La ludo de la hundo aŭ de la 30 poentoj venis pli malfrue ; ĝi montriĝis precipe en la Meza Imperio (2.000-1.800 ant. K.) ; poste ĝi malaperis kaj ĝi neniam estis reprezentita en la tomboj. En la akso de rektangula ludo-tablo, palmo estis desegnita ; ambaŭflanke de la arbo estis truoj : 30 je dekstro kaj 30 je maldekstro ; ĉiu ludanto disponis 30 truojn laŭ kiuj li antaŭenirigis 5 eburajn najlojn kun hunda kapo ; la elirpunkto situis sub la brancoj ; la fina punkto situis super la arbo ; tiu ĉi fosaĵo estis ĉirkaŭita de magia nodo nomita « shen ». Oni malbone konas la lud-regulojn ; la truoj 15 kaj 25 portis la hieroglifan signon « nefer », kiu signifas « bona » ; eble ili permesis duobligi la poentojn. Linioj kunligis la 6 kun la 20 kaj la 8 kun la 10 ; eble tiuj linioj estis regresigaj. La movoj estis determinitaj helpe de ludostoj ; ili rolis kiel niaj ĵetkuboj.

La plej populara el la ludoj estis la « zenet » (netaŭge nomita : la Egipta damludo). Oni trovis multajn pentritajn reprezentaĵojn kaj multajn specimenojn en Tebo (Nova Imperio 1.500-1.100 ant. K.) ; ĝis estis la preferata distraĵo de la mortintoj. Ofte oni metis en la tombokelon damludon, peonojn kaj ludostojn. La pentraĵoj de la grandaj Tebaj tombejoj montras al ni la Mastron, kiu ludas, en la transmondo, kun sia edzino.

La damtabulo enhavis 3 vicojn da 10 ĉeloj ; ĉiu ludanto havis 5 peonojn (unuj kun plata kapo, la aliaj kun ronda kapo) ; la ludostoj determinis la movojn de la peonoj.

La numero 30 havis magian valoron ; ŝajne ĝi simbolis aron da 30 diaĵoj, iuj plenumis juĝan funkcion. Al la gajnanto oni diris : « ci estas pravigita ». Laŭ la legendo, oni ankaŭ tion diris favore al Osiriso, dio de la mortintoj. Ĉiu ludparto simbole iĝis juĝado. Kelkfoje la kontraŭulo ne estis reprezentita ; lia anomimeco kovris la forton de la Malbono, kiu kontraŭstaris la pravigon de la ludanto, kiu ludis kontraŭ sia malbona Sorto.

Laŭ konceptaĵoj arkaikaj kaj jarmilaj, la reprezentado de la ĉaso kaj de la aliaj distraĵoj en la tomboj elvokis ne nur la familian kadron, sed ankaŭ la funebran vojaĝon de la mortinto, dum kiu li devis lukti kontraŭ la detruemaj spiritoj de la transmondo, antaŭ ol triumfe renaskiĝi.

# LA VENTMUELEJOJ EN NEDERLANDO

*En la kadro de la ĝenerala temo « La homo kaj la maŝino » de la dua periodo-1974 en Grésillon s-ro L. Chasseriaud kaj mi havis la taskon prelegi pri tiu speciala maŝino kiu bezonas nur naturan energion : la muelilo.*

*Jen sekvas resumo de la prelego pri la diversaj tipoj de la nederlandaj muelejoj. La pedanta precizemo de Esperanto tre taŭgas tie-ĉi por diferencigi inter muelilo kaj muelejo.*

Kiam en internacia rondo aŭdiĝas la vorto « Nederlando » jam baldaŭ iu flustras « tulipo » aŭ « muelejo ». En la tuta mondo la tulipo aŭ la muelejo estas kvazaŭ la rekonilo, la emblemo por Nederlando. Tial ŝajnas utile al mi akcenti tie ĉi, ke nek la tulipo (aŭ alia bulbofloro), nek la muelejo estas origine nederlanda. La tulipo estas importita en la 17a jarcento, verŝajne el sudorienta Eŭropo, la unuaj muelejoj estas konstruitaj tie ĉi ĉirkaŭ la jaro 1000. S-ro Chasseriaud, kies temo estis pli vasta ol mia, parolis pri historie pruvitaj muelejoj en sudeŭropaj landoj en pli fruaj jarcentoj. La specialistoj supozas, ke la ideo uzi la venton anstataŭ homa forto estas importita de revenintaj krucmilitaj kavaliroj, kiuj vidis en suda Eŭropo muelejojn, funkciantajn per venta aŭ per akva forto.

En Nederlando, lando relative ebena, la vento abundas, ĝi povas veni el ĉiuj direktoj, do estas kompreneble, ke ĝuste la ventmuelejo evoluis plej multe tie ĉi. La radegoj de akvomuelejoj povas funkcii nur per akvo falanta de supra nivelo al malpli supra, fenomeno do malofta en ebena lando.

La jam nomitaj kavaliroj — Grandaj Sinjoroj en sia regiono — estis krom potencaj ankaŭ ruzaj kaj mon-avidaj : ili alproprigis al si la venton ! Ili diris : « la vento blovas super nia regiono, sekve .... la vento estas nia posedaĵo ». Simila jura rezono ja validas pri ĉasrajto. Ili tial puntedonis sian venton al muelistoj kontraŭ pago de certa sumo jare, ili havis tiamaniere la *ventrajton.* Aliflanke la muelisto, « farminta » la venton kaj paganta por la uzo de la vento, havis pro tio ekskluzivan rajton je maksimuma amaso da vento. Neniu rajtis malebligi la liberan alvenon de vento al la muelejo. En la dokumentoj pri la *rajto je libera vento* troviĝas tial diversaj paragrafoj, malpermesantaj al najbaroj de la muelisto aŭ al aliaj urbanoj kaj vilaĝanoj konstrui domojn pli altajn ol la muelejo aŭ kreskigi tro altajn arbojn en la ĉirkaŭaĵo de la muelejo.

Spite tion oni vidas, ke en la daŭro de la jarcentoj la muelejoj estas konstruitaj pli alten por havigi plej eblan liberan venton aŭ oni konstruis muelejojn sur la remparoj de la urboj, kelkafoje oni plialtigis fortikaĵan muron por tiu celo : la *turmuelejo,* similanta al staranta cilindro, malpli gracia ol la muelejo, kies subo estas pli « dika » ol la tegmento. En arbaraj regionoj oni konstruis muelejojn sur artefaritaj montetoj : la *monteta muelejo.*

La altaj muelejoj, precipe troveblaj en urboj, havis la malavantaĝon, ke la muelisto devis grimpi sennombrajn ŝtupojn por funkciigi la ilaron. Tial oni konstruis je la duono de la alteco kaj ĉirkaŭ la tuta korpo de la muelejo balkonon kun balustrado, sur kiu troviĝas la aparatoj por (mal) funkciigi la muelilon aŭ por turni la aloparon (vidu fig. 1).

## MUELEJAJ TIPOJ

Oni povas dividi la diversajn tipojn de ventmuelejoj laŭ ilia ekstero aŭ laŭ ilia celo. Se ili estas uzataj por funkciigi pumpilojn, do por senakvigi kampojn, situantajn sub la akva nivelo, ni nomas ilin *akvomuelejoj.* (Verdire ili ne muelas la akvon !). La nomo estas iom erariga, ĉar ankaŭ la muelejo, movata de akvorado, havas la nomon akvomuelejo. En ilia pumpfunkcio oni trovas tiujn ĉi akvomuelejojn ĉefe en la nordaj kaj okcidentaj provincoj de Nederlando, distriktoj kiuj tute subakviĝus, se subite ĉiuj digoj malaperus aŭ se subite ĉiuj muelejoj difektiĝus. La ĉiam evoluanta tekniko preskaŭ nuligis tiun ĉi funkcion de la muelejo : la plimulto de la pumpiloj nun ja estas movataj per elektra kurento. Spite tion pluraj estraroj de polderoj ankoraŭ nun konservas en bona stato — kvazaŭ rezerva forto — siajn muelejojn. Se katastrofo senigus nin de elektro, vento ĉiam blovas en Nederlando !

## INDUSTRIAJ MUELEJOJ

La industriaj muelejoj fakte estis normalaj fabrikejoj, en kiuj la vento liveras la necesan energion. Plej konata estas la grenmuelejo, sed en la regiono de la rivero Zaan, norde de Amsterdam oni trovis multajn lignosegejojn. Ili malaperis proporcie al la evoluo de ŝtalo kiel konstrumaterialo por ŝipoj. Aliaj industriaj muelejoj premis (« batis » estis la teknika esprimo) oleon el semeroj, senŝeligis rizon kaj aliajn grajnojn, muelis plej diversajn spicaĵojn aŭ tabakon (« flartabako ») aŭ fabrikis paperon. Ankoraŭ nun luksa papero devenas el muelejoj. Ne necesas akcenti, ke la plimulto de tiuj industriaj muelejoj malaperis en la 19a jarcento, la epoko de la disvastiĝo de vaporo kiel energifonto. La 20a jarcento finis tiun batalon inter ventenergio kaj vaporenergio, enkondukante la elektromotoron. En 1850 ankoraŭ 9.000 muelejoj estis troveblaj en nia lando, nun restas apenaŭ mil, zorge flegataj kiel historiaj monumentoj.

La plej malnovan tipon de industria muelejo montras figuro 2 : la *fostmuelejo.* La tuta, granda, ligna korpo turniĝas kun la ekstera ŝtuparo (la

« vosto ») ĉirkaŭ longa, fortega, vertikala pivoto. Bedaŭrinde nur kelkaj ekzempleroj de tiu ĉi tipo estas ankoraŭ troveblaj. La fakto, ke ili estas konstruitaj el ligno kaŭzis la rapidan ruiniĝon en nia malseka klimato.

## LA AKVOMUELEJOJ

Plej karakterizaj ankoraŭ nun en la nederlanda pejzaĝo estas la akvomuelejoj, ventmuelejoj do movantaj pumpilojn. La ĉefajn tipojn vi vidas en figuroj 3 kaj 4. En ambaŭ la tuta tegmento estas turnebla. La tegmenton de la muelejo en figuro 3 oni movas de sur la tero, figuro 4 montras muelejon, en kiu la muelisto devas grimpi al la subtegmentejo por turni la muelejan kapon. Tiun agon oni nomas « meti la muelejon sur la vento ».

Ambaŭ tipoj estas precipe troveblaj en Holando, figuro 3 estas la tipo de Suda Holando, figuro 4 tiu de Norda Holando. Holando ja estas la okcidenta parto de Nederlando, la regiono kun la plej grandaj urboj.

La ĵus nomitaj muelejoj estas iom kompaktaj laŭ ekstero. En ilia korpo estas sufiĉe da spaco por agrabla loĝejo de la muelista familio. Pli gracia, pli eleganta estas la tipo de figuro 5 : la *balancila muelejo* (en mia lando oni nomas ĝin « aranea kapo »). La tuta kvadrata supro kun la ŝtuparo (la vosto) estas turnebla. En la teretaĝo ne estas multa spaco por loĝejo. Ankoraŭ malpli granda estas la *herbeja muelilo* de figuro 6 ; ĝi funkcias aŭtomate, ĉar la granda plata vosto zorgas pri tio, ke la aloj ĉiam estas en ĝusta pozicio al la vento. La tuto estas alta nur kelkajn metrojn.


M. de WAARD.

---


*N. B.* — Oni atentu, ke en ĉiuj figuroj la blanka parto estas movebla (turnebla al la vento), la nigra parto estas firma.




Figuro 1




Figuro 4




Figuro 2



Figuro 5



Figuro 3



Figuro 6

# Maltrankviloj de biologo

Ni pli kaj pli iĝas nesentemaj pri la sensaciaĵoj de la biologio : ĉar, de nun, ni scias, ke la povoj de la Homo kapablos ekzerciĝi en ĉiuj sferoj de nia agado vitala aŭ eĉ psika. Oni efikos sur la personeco, sur la heredeco, sur la sentimentaleco ; jam oni parolis pri la ebleco inokuli memoraĵojn. Nenio plu emocias aŭ mirigas nin ; oni apenaŭ estas komprenintaj, ke ĉio eblas, ke ĉio estas kvazaŭ realigita. Facile akceptante, ke ni ĉion povas, kion ni faros el tiu ĉiopovo ?

La unua ulo, kiu metis floron en vazon, praktikis organo-kultivadon en « bokalo ». Kiu certigas, ke oni fabrikos la Vivon, ne riskas dementon ; li ĉiam povas sin turni al estonteco. Plie, tia fido vigligas la esploradon ; klopodante por rekonstrui la Vivon, oni trovas multajn aliajn interesaĵojn.

Tion dirinte, mi tute ne estas certa, ke oni sukcesos refari la Vivon.

Pri artefabrikado de la Vivo, la eksperimento, jam de la komenco, estas falsita : ĉar, en tiun kemian supon, oni estas metinta tiun ingrediencon : la homan spiriton.

Vole nevole, fare de la biologio, ni aliras al alia mondo, kiu, probable, estos nek la plej bona, nek la plej malbona. La aspekto la plej emocia de tiu proksima estonteco estas tiu, kiu tuŝas la intencan modifon de la Homo mem ; ĉu uzante la metodojn por eŭgenika selekto, ĉu rekte efikante sur la nukleajn acidojn determinantajn la heredecon. Kaj, ĉi tie, mi ne pensas pri la uzo, kiun povus eltiri el tiaj povoj, malhumanaj diktatoroj ; nek ankaŭ al la rezultoj de nerigoraj eksperimentoj. Ambaŭ kazoj pravigas la pesimistan deklaron de Etienne Wolf : « Estas permesate esperi iom, timi multon ».

Tiu antropoteknika industrio ne estas por morgaŭ ; sed ĝi okazos. La homaj estaĵoj ne povas malhelpi, ke ili baldaŭ rigardos sin kiel simplan denaskan materialon, el kiu ili klopodos eltiri la plej bonan profiton, kiel hodiaŭ ili diligentas por pliboniĝi la kvaliton de ŝtalo aŭ de kaŭĉuko.

Ĝis tiuj lastaj jaroj oni rifuzis apliki al la homa estaĵo la selekto-metodojn : oni, ĝis nun, ilin konsideris malnobligantaj, malhumanigantaj, kontraŭaj al la digneco de la pensanta estaĵo. Oni denuncis « ĝian veterinaran spiriton », kiu malaltigus la homaron ĝis la nivelo de brutaro pli malpli produktiva.

Nune, je la nomo de la Scienco, oni refutas la rajtecon de la eŭgenika pretendo. Ne nur, oni diras, ni ne sufiĉe scias pri homa heredeco por permesi al ni tuŝi la genetikan strukturon de nia specio, sed, kiel elimini la Malbonon por gardi la Bonon, se ni konsideras, ke la hodiaŭa Malbono eble estos la morgaŭa Bono ? Ankaŭ necesas savi tiun riĉecon, tiun genetikan plurecon, kiun, ĝis ni, alportis la longa evoluado de la Natura selektado.

Tiuj kontraŭdiroj memorigas tiujn, kiujn oni iam esprimis kontraŭ la medicinaj kaj kirurgaj intervenoj, kiujn oni akuzis esti atencemaj kontraŭ la natura ekvilibro de la organismo. « Ne tuŝu la verkon de Dio » oni diris, kaj ankoraŭ diras kelkaj Naturo-respektemuloj. « Ne tuŝu la ellaboraĵon de la Natura selektado » diras hodiaŭ kelkaj scienculoj. Atendi, ke oni sufiĉe scios por eksperimenti en plena lumo estas sin kondamni al neaktiveco. La progresoj de la scienco ofte kondukis al la anstataŭado de la Naturo per artefaritaĵo ; ili kontraŭis la « Tabuon de la Naturo ». Kiam Reaumur en la 18-a jarcento uzis la bakujon de la panisto por kovadi la kokinajn ovojn, li renkontis multajn kritikojn : « Tiuj kokidoj estos kriplaj, misformitaj ; ili ne lasos sin grasigi ; ili estos emaj je malsanoj, nekapablaj reprodukti sian specion ; iliaj ovoj, kondiĉe ke ili kapablas ovodemeti, estos malbongustaj K. T. P. ».

Certe, iun tagon aŭ alian, la biologio kapablos plialtigi la fizikan kaj moralan rendimenton de nia specio, igante ĝin kapabla atingi aŭ proksimiĝi al certaj celoj antaŭe fiksitaj ; Resume : ĝi scipovos agi multe pli bone ol la hodiaŭa homo.

Sed, kiamaniere ni akceptos tiun artefaritan plejbonon ? ĉu, sen naŭzo, ni akceptos la efektivigon de tiuj homoj laŭmezure prilaboritaj, konformaj al ideala prototipo ; de tiuj homoj antaŭe « programitaj » por la utilo de la Socio, ja por ilia propra feliĉo ?

Ĝenerale, la scienculoj montriĝas malpli turmentitaj ; ili tenas, ke la homo adaptiĝos al tiuj novaj povoj, el kiuj li eltiros sian profiton. Cetere, ĉu la naturo estas alio ol « malnova kutimo » ? Miaflanke, kvankam persvadita, ke ni direktiĝas al tia estonteco, larĝparte de mi mem akceptanta la entreprenon, kiu devas plialtigi nian specion, mi konfesas, ke mi ne povas ne senti iom da ĝeno antaŭ tiu skiziĝanta mondo regata de la biologio kaj de la kemio, kie la plejbono de la homo estos antaŭvidita, antaŭkalkulita ; la talento, la sindoniteco, la virto estos laŭvole havigitaj per teknikaj artefaritaĵoj.

Pli kaj pli gajnante tiom da potenco sur la korpoj, sur la ĝermoj, sur la cerboj, ĉu ni fine ne forprenos de la ekzistado iom da ĝia graveco ? Laŭmezure kiel niaj teknikoj permesos pliboniĝi la moralajn kaj fizikajn ecojn de la homo, ili tendencos uniformiĝi la homan trupon.

Kelkaj inter la scienculoj konsterniĝas antaŭ la disvolvado de la biologio. Kvankam ili havas racian cerbon, ili gardis la koron sufiĉe religia, por ke la homa protoplasmo al ili restu sankta aĵo. Tamen oni devas rimarki, ke certaj religiaj biologoj, vidante la homon fali en la potencon de siaj teknikoj, ne sentas konfuziĝon. Por ili, la animo estas neatingebla. Teilhard de Chardin diras : « Eĉ se oni tremas, eminente estas, sur tiu kampo de la modifo de la Homo fare de la Homo mem, ke ni devas ĝis fine ĉion provi ». Tio ĉi estas natura pozicio de spirito, kiu vidas, en la scienco, dian faron, kaj por kiu, entute, la senco de la biologio konfuziĝas kun la senco de la evoluado kondukita de la Kreinto.

Ĉu per kemio moraligi la homon estas demoralizanta ? Sed kial, per la kemio prilaborita en laboratorio oni ne korektus la senintencan kemion de la Naturo ?

Morgaŭ oni komandos al la pensoj, al la sentoj : oni forigos la lacecon, la doloron, la ĉagrenon. Estos plu nenio amota, respektota, suferota ? Ni povos nur POVI. Kia mizero !

Ni tuj lernos ŝanĝi la Homon, antaŭ ol scii, kio estas la Homo. Pri multaj biologiaj inventaĵoj, la aplikado al la Homo okazos sen problemo. Sed pri partenogenezo, kromosoma stikado, gravedeco en bokalo, konservado de la spermo cele al postmorta ensemado, modifo de la nukleaj acidoj determinantaj la heredecon ? Ĉi tie estas vasta kampo, kie la konsento, kiel la malkonsento dependas de la socialaj moralaj kaj religiaj konceptoj kaj ankaŭ eble de la persona sentemo. Tia persono akceptus, ke oni modifu la nukleajn acidojn sed rifuzas la senpatran generadon. Tia alia rifuzas la gravedecon en bokalo sed ne kontraŭas la prokrastitan patrecon. Alia preferas gravedecon en bokalo por ke la infano formiĝu en neŭtrala tereno.

Kiel fari, por ke nia mondo kiu fatale iras al pliboniĝo, ne tute iĝu la Plejbona Mondo ?


El Jean Rostand.

# MEZEPOKAJ ŝILDOJ

La ŝildoj estas heredigo de la antikvaj tempoj ; ilia origino perdiĝas en la nokto de la tempoj. Ankaŭ uzataj ĉe la Romanioj, ili postvivis malgraŭ la konfuzoj de la Barbaraj Invadoj kaj de la Alta Mezepoko. Dank'al la impeto de la 12-a jarcento, ili renaskiĝis, ekfloris en la 15-a kaj la 16-a j. kaj iom post iom malaperis fine de la 18-a j. Iliaj nomoj kaj temoj reprezentas veran antologion de la ĉiutagaj kutimoj de la popoloj.

Ĝis la 13-a jarcento, la urboj entenis nur kelkajn centojn da domoj. La loĝantoj konis unuj la aliajn kaj la fremduloj estis raraj. Domoj kaj stratetoj ne bezonis nomon. La 12-a jarcento alportis ekonomikan transformon : foiroj kaj kreskado de la urboj, kiuj, de tiam, akceptis fremdajn vojaĝantojn kaj komercistojn. La urbanoj kaj eksterlandanoj perdiĝis en tiuj novaj nekonataj kvartaloj. Oni komencis doni nomon al la stratoj kaj ankaŭ al tiuj trabaj domoj kun korbeloj, kiuj tute similis unuj la aliajn. La ŝildo iĝis lokalizilon en la tuta Mezepoka Okcidento.

La Mezepokulo estis analfabeta ; li konis nur la ŝton-evangelion, skulptita sur la porĉoj de la katedraloj kaj kiun la klerikoj eksplikis al li : Virgulino, Kristo, anĝeloj kaj sanktuloj estis fa-



miliaraj. Oni ilin reprezentis sur la pordoj de la domoj aŭ ĉe ties angulo, ĉe vojkruciĝo, aŭ en niĉo. La statuo estis el ligno, kelkfoje pentrita je vivaj koloroj, el gipso, el tera koto, eĉ el ŝtono ; en la ŝtono oni ankaŭ skulptis bareliefojn.

La statuoj estis Sankt-Katerina, Sankt-Johano-Baptisto... ĉiu korporacio longtempe havis propran statuon, kiu reprezentis ĝian sanktan Patronon. Ĉeesto de la statuo certigis protekton al la domanoj.

Laŭlonge de la jarcentoj, la temoj iĝis laikaj (la domo de la simio, en kiu naskiĝis Molière). Multaj temoj origine estis religiaj : la leono estis la atributo de Sankt-Marko ; la aglo apartenis al Sankt-Johano, la ŝlosilo al Sankt-Petro. En Ploërmel (Bretonio) sur la Domo de la Koboldoj, la sankta Episkopo najbariĝas kun la Koboldoj laikaj.

## LA KOMERCAJ ŝILDOJ

La komercaj ŝildoj estis tre malsamaj. Ili postvivis ĝis la 19-a jarcento, dum la domaj ŝildoj malaperis en la 15-a. Hodiaŭ ni ankoraŭ vidas la karoton de la tabak-vendejoj kaj la kruco de la apotekoj. En niaj kvartaloj brilas la lumaj ŝildoj.

Alvenante en urbon, la fremdulo nature serĉis drinkejon aŭ albergon. La unuaj ŝildoj montris « Korkon » ; ĝi estis bukedo de arbo-branĉoj pendigita super la pordo ; ĝi anoncis drinkejon en domo tute simila al la aliaj. La drinkejistoj uzis ankaŭ la abian konuson, kiu estis atributo de Dionizo-Bakko : ĝi memorigis la rezinon, kiun ia Grekoj metis — kaj ankoraŭ metas — en la vinon. Estas nur la 18a j., kiu ornamis la drinkejoj per belaj kradoj, superstaritaj per abiaj konusoj, kaj kiujn ni nuntempe povas kelkfoje admiri.

La aliaj komercistoj ankaŭ volis sian ŝildon por altiri la klientojn. Tial ili prenis la kutimon alkroĉi al sia butiko specimenon de siaj varoj : barbo-plado, ŝtrumpo, rado, K.T.P.

Nur en la 17-a j., tiuj objektoj estis pendigitaj, ekstreme de bastono, perpendikle al la fasado, por igi ilin videblaj de malproksime. Iom post iom la veraj objektoj estis anstataŭigitaj per eltondita lado. Oni havis veran floradon da elpendaĵoj precipe kiam la korporacioj loĝis en la sama strato : strato de la buĉistoj — kajo de la oraĵistoj.

Ĉar la homoj komencis legi, oni pli kaj pli uzis skribitajn frazojn : « ĉe la ruĝa ĉevalo — ĉe la ora falĉileto — ĉe la korno de cervo » ; kelkaj estis pli pitoreskaj : « la pigo, kiu trinkas — la kato, kiu ne dormas — la verda simio ». Tiuj sloganoj permesis distingi la domojn, precipe en tiuj korporaciaj stratoj.

La plej belaj elpendaĵoj estis el forĝita fero ; stile kaj teknike ili evoluis laŭ la arto de la ferajaro ; ili estis veraj artaj kreaĵoj, kies ellaborado estis severe kontrolita de la Majstro. En la 18-a jarcento, tiuj elpendaĵoj, kiuj, en la ventaj tagoj,


dangĝere balanciĝis super la pasantoj, estis malpermesitaj de polica ordono. Oni ilin anstataŭigis per larĝaj pentritaj, ŝtofaj bendoj, kiujn oni pendigis je la antaŭtegmento de la magazenoj. La plej fama estis tiu, kiun Watteau pentris por la pentraĵa galerio de sia amiko Gersaint.

En la 19-a j. la ŝildoj perdis sian artan karakteron. Sub la Unua Imperio oni vidis grandnombre bov-kaj-ĉeval-kapojn. Je la fino de tiu jarcento la plejmulto el la magazenoj havis montrofenestrojn el ligno skulptita aŭ pentrita, sur kiuj paneloj indikis la nomon de la proprietulo.

Kelkaj mezepokaj ŝildoj estis denove uzitaj sur nove konstruitaj domoj ; sed la plimulto malaperis pro la malbonaj veteroj, pro la detruoj, pro malatento. Arkivoj kaj tekstoj de verkistoj alportis ĝis ni la bildon de tiuj malnovaj ŝildoj.

Majstro F. Villon « Granda malpendiganto de elpendaĵoj ». La mezepokaj studentoj, kiel tiuj de ĉiuj epokoj, ŝatis fari ŝercojn. François Villon (15-a j.) kaj liaj amikoj, damaĝe al la butikistoj, plezuris interverti la ŝildojn.

En sia « Malgranda Testamento » li humore testamentis al siaj amikoj la ŝildojn de la drinkejoj kaj de la « Bordeloj », en kiuj li multe plaĉiĝis, kaj kiujn li famigis : « la urso — la porkino, kiu ŝpinas » — « la abia konuso » (en kiu pli poste retroviĝis Rabelais — Ronsard — Du Bellay — Molière — Racine) — « la Kvar filoj Aymon en la strato de la Harpo » ; « ĉe la flugludilo, ĉe la mulino, ĉe la bareleto, ĉe la helmo » — « la kato, kiu fiŝkaptas — la tera poto — la or-spindeloj ».



Ni diras ankoraŭ : « loĝantaj ĉe la sama ŝildo — bona vino ne bezonas ŝildo — loĝantaj sub la bela stelo », kiu elvokas la faman hotelon.

Ni esprimas senĉesan omaĝon al niaj inĝeniaj prauloj, kiuj kreis universalan lingvaĵon, kiu daŭris plurajn jarcentojn, multe pli pitoreskan ol niaj bluaj-blankaj nuntempaj strat-kaj-dompaneletoj.

# KVERELO ĈE LA LAGO

— Kiel bone vi parolas Esperanton ! — mi diris al mia juna amiko — Kiel vi lernis ĝin ?

— Ho, tio estas simpla historio ! — li respondis ridetante — sed se vin interesas ! Ĝi komenciĝis ĉe la lago Balaton.

— Nu, tio interesas min. Nur rakontu !

— Foje mi sidis ĉe la bordo sur blanka benko. Antaŭ mi ondetis la grizverdeta akvo, dekstre susuris kanoj. Jus mi pensis pri tio, ke tiu soleca meditado ĉe la lago ne kontentigas min, kiam mi ekaŭdis susuron — sed ne flanke de la kanoj. La arbetoj kaj arbustoj moviĝis malantaŭ mi kaj kiam mi ekturnis min, mi ekvidis, ke junulino kuregas rekte al mi kaj en la sekvanta momento ŝi jam forte ĉirkaŭbrakis min kriante :

— Helpu, helpu ! Savu min !

Nu, mi pensis, ĉu Dio aŭdis mian deziron, ke tiel subite ĉesis mia soleco ? La knabineto ja estis ĉarma, belvizaĝa, brunaj harbukloj ondetis sur ŝiajn ŝultrojn. Verdire al mi ĉiam pli multe plaĉis la blondulinoj. Sed nun ne estis tempo elektadi !

— Trankviliĝu, knabineto ! — mi diris milde —. Kio timigis vin ?

— Li, li — ŝi ankoraŭ haste spiris sur mian nukon —. Li volas ĵeti min en la akvon !

— Sed kiu do ?

— Mia fianĉo ! Ha, jen li venas ! Defendu min !

Vere en tiu momento ekaperis inter la arbetoj belstatua junulo, spiregante kaj kun iom kolora vizaĝo !

— Ha, vi jam trovis alian kunlernanton ! Do bone ! Estu feliĉa ! — li kriis kaj returniĝante malaperis inter la arbetoj.

— Alfredo ! Alfredo ! Ne foriru ! Atendu min ! Revenu ! — kriis la knabineto, sed vane ! Alfredo ŝajne havis pli urĝan aferon kaj ne revenis.

— Jen tia li estas ! — ŝi diris denove sin turnante al mi kaj jam ne ĉirkaŭbrakante min — kvankam tio estis sufiĉe agrabla por mi — sed ŝi ankoraŭ firme tenis mian manon.

— Ĉu vi jam delonge estis gefianĉoj ? — mi demandis kun ŝajna intereso !

— Jam de du semajnoj ! — ŝi diris melodie-voĉe.

— Kaj ĉu vi ne kutimis kvereli unu kun la alia ?

— Sed jes ja — ŝi ridetis, montrante siajn blankajn dentetojn. Eĉ ofte kaj... kiel bone estas poste repaciĝi !

— Nu, ne timu ! — karesis ŝian vangon — Certe ankaŭ nun vi baldaŭ repaciĝos ! — Kaj dume mi pensis, kiel bone estus, se mi ankaŭ havus tiajn okazojn por... repaciĝi.

— Jes, sed li devas peti pardonon kaj li ne minacu min. En akvon mi iros, kiam mi volas. Ŝi aldonis seriozmiene.

— Sed kio okazis do inter vi, ke li tiel ekkoleris ? Ho, nenio grava, mi nur ne pretigis mian lecionon por hodiaŭ. Vi devas ja scii, ke hieraŭ ni dancadis ĝis malfrua nokto. Hodiaŭ mi devis ion kudri sur mia robo, kiu — nu kiu iom ŝiriĝis dum la dancado. Do kiam mi estus havinta tempon pretigi lecionon ?

— Pri kia leciono temis ? — mi demandis nun jam scivole.

— Pri kio ? Pri Esperanta leciono. Esperanto estas...

— Mi scias, la internacia lingvo, mi jam legis pri ĝi. Kaj dume mi ekpensis, ke vere foje mi mem deziris lerni ĝin. Sed mi ne pensis pri tia ĉarma ebleco !

— Kiamaniere vi komencis lerni ĝin ?

— Estis simpla afero. La Esperantista Junularo arangis ian dancvesperon. Mia amikino, kiu konis tie junulon, kunvokis min. Tie mi povis bone danci kun kelkaj.

— Sed plej bone kun belstatura blonda junulo, ĉu ne ?

— Vi divenis ! — ŝi mire diris — sed kiel vi eksciis tion ?

Li iom amindumis min, demandis min, ĉu mi ne ŝatus lerni Esperanton. Mi volonte kapjesis kaj poste — nu, ni promenadis, estis belaj posttagmezoj, eĉ vesperoj. Ni estis jen en la urba arbareto, jen sur la Margaretinsulo, jen... sed eble tio ne interesas vin ?

— Sed jes, eĉ tre. Do vi lernadis Esperanton.

— Kompreneble ni lernis Esperanton kaj ankaŭ... Sed tiam ŝi ekruĝiĝis. Vere ŝi estis tre ĉarma.

— Nu kaj poste ?

— Poste mi invitis lin al nia hejmo, li plaĉis ankaŭ al mia patrino. Kaj antaŭ du semajnoj, kiam mi pretiĝis veni ĉi tien por libertempo, ni gefianĉiĝis. Li ankaŭ postvenis ricevinte sian libertempon.

— Kaj vi nun lernadas kaj kvereladas.

— Nu, verdire la kverelo eble ne estis nur pro la leciono, sed pro letero. Mi ricevis adresojn en la Esperanto-grupo kaj komencis korespondadi kun junaj viroj, kompreneble.

— Sed por li tio ja ne estis komprenebla ? Ĉu ne ?

— Vere ne, kvankam mi diris, ke tio estas nur ekzercado, amuzado, tempopasigilo. Li ne volis konsenti kaj nun, tiam li trovis en mia lernolibro la foton de mia pola korespondanto... ankaŭ beleta junulo — ŝi aldonis —. Nu, tiam li demandis, ĉu mi ankaŭ sendos al li mian foton ? Kial ne ? mi diris fiere. Tiam li ekkaptis min kaj kriis, ke li tuj ĵetos min en la lagon. Mi sukcesi eltiris min kaj... la ceteron vi jam scias. Sed, sed mi jam neniam pensis, ke mi estos iam malfidela al li, mi vere amas lin...

— Trankviliĝu, etulino — mi diris — li certe repaciĝos ! En tiu momento ŝi eltiris sian maneton el la mia. Mi ja volonte tenis ĝin dum nia babilado. Ĝar tiam ekaperis denove inter la arbetoj Alfredo.

— Terinjo ! Ĉu vi venos naĝi ?

— Jes, tuj — ŝi ĝoje ekkriis kaj flustrante al mi : Adiaŭ ! ŝi jam malaperis, kiel eta feino, kun sia fianĉo. Mi denove restis sola.

— Jes, jes, sed kio sekvis ?

— Nenio grava ! Hejmenveninte mi vizitis Esperanto-grupon kaj demandis, kiel mi povus rapide lerni la internacian lingvon, ĉar mi vidas grandajn perspektivojn en tio.

— Nu kaj, kiel vi lernis ?

— Mi diris, ke mi preferas junulinon, kompreneble laŭeble blondulinon.

— Kaj poste ? — mi demandis scivole pri, la detaloj.

— Jen estas ! — li montris fiere la oran ringeton sur sia fingro. — Ĝi sukcesis !

Kion mi povis ankoraŭ demandi aŭ diri al li ? Li ja vere flue kaj bele parolis la internacian lingvon kaj baldaŭ iros al najbarlanda kongreseto. Na, kompreneble ne sola.

— Mi kore gratulas al vi ! — mi diris serioze kaj interne mi pensis : Ho, feliĉa junularo !

P. BALKANYI.

# POR VIA DISTRO

## SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

### KIU ESTAS LA MURDISTO ?

Estu A. B, C, D, E la lokoj de la 5 kunmanĝantoj.

1°) Kiu alportis sangokolbason sidanta en A (3) povus esti nek la gastigantino kiu sidas en B (16), nek la gajiganto (12), nek la belulino aŭ la kuzo kiuj sidas unu apud la alia (8). Do estas la gastiganto kiu stomakdoloras (4) kaj kantis « la felico »-n (6), (11), (13), (15).

2°) La gastigantino kiu ricevis la libron (2) alportis ĉu ostrojn, ĉu trufojn (3), (5), (12). Se ŝi alportis ostrojn, ŝi kapdoloras kaj povas kanti nenion (6), (11), (13), (15). Do ŝi alportis trufojn kaj kantis « la espero »-n (15). Ŝi naŭzas (2), (7), (10), (11).

3°) Kiu hepatdoloras povis nur alporti kaviaron (7), (5 kaj 10). Estas la gajiganto kiu ricevis gantojn (10), kantis « la tagiĝo »-n kaj sidas meze (13).

4°) La gastiganto ricevis la vazon (14). La belulino sidas en D kaj la kuzo en E (8). Li kantis « la aŭtuno »-n. Do la belulino kantis « donu al mi vian manon » kaj genudoloras (11). La kuzo kapdoloras kaj alportis ostrojn (7). La belulino alportis la bovaĵon kaj ricevis aŭtomobilon.

5°) Do la kuzo ricevis la revolveron kaj estas la murdisto.


### KAŜITA POEMO

La konata esperanta poemo kaŝita en la grupo de 152 difinitaj literoj estas la jena :

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj ;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.
Nenio en la mondo elŝiros ĝin for,
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

## NOVA PROBLEMO

### KRUCVORTOJ
### (proponitaj de S-ro Musset)



#### HORIZONTALE

**(SF)** = vorto sen finaĵo

1. Kontrakto por monsekurigado — kudrilego por la ŝuisto.
2. Akompanas anason... en plado — plezurplena loko — peceto **(SF).**
3. Klasigebla folieto sur kiu oni skribas notojn — orelmalsano.
4. Unuan epokon de la terciara epoko — magia ŝirmilo kiu protektas kontraŭ danĝeroj **(SF).**
5. Pentraĵo kultita de la ortodoksuloj — substanco uzata por rigidigi tolaĵon.
6. Cifero — muldi sur objekto.
7. Malvera — membro de grupo — lulilo de la kokido !
8. Preno de instrumento por atingi celon — ĝi blankigas la sidvangojn de la beboj **(SF)** — ritma melodio **(SF).**
9. Kun moka kaj falsa dirmaniero — aŭdigi sekan sonon per frapado **(SF).**
10. Lacigi pro troripetiĝo aŭ troabundo **(SF)** — severe peti ion pro sia rajto aŭ forto.
11. Anstataŭas ĉj aŭ nj — superita de malamiko — prepozicio montranta direkton aŭ celon de ia movo...
12. Parto de preĝejo inter pordo kaj ĥorejo **(SF)** — bordo de oceano ! — sabloportanta dezertvento afrika.
13. Muzika teatraĵo (SF) — sufikso kiu esprimas adepton de iu teorio, skolo... — agi same kiel modelo **(SF).**

#### VERTIKALE

1. Malsaĝa homo **(SF)** — ŝtolo el lino kaj kotono.
2. Ĝi permesas tuj diferenci marakvon kaj riverakvon — verda insulo meze de dezerto **(SF)** — stadio **(SF).**
3. Kurbo naskita de cirkla punkto rulanta sur la periferio de alia cirklo **(SF)** — plendon pro malfelico.
4. Rusa monero tre malgranda **(SF).**
5. Vorto imitanta naturajn bruojn.
6. Prefikso montranta ripeton — frakcio — antaŭsciigi.
7. Lirika poemo, dividita en strofoj — konkubino, en la turkaj haremoj **(SF).**
8. Malgranda — Maigret aŭ Sherlock Holmes **(SF).**
9. Besto — japana poemeto de tridek unu silaboj en kvin versoj **(SF).**
10. Disdoni ion post konsulto de la sorto — saluti per favoraj krioj.
11. Grasa fluaĵo animala, vegetala, aŭ minerala **(SF)** — Refaldi borderon ĉe tuko aŭ vesto — sufikso sen difinita senso.
12. Malpermesa vorto — angla biero **(SF)** — poseda pronomo — havi inklinon por iu.
13. Parolisto — ĝisgenua vira pantaloneto **(SF).**

# GRAMATIKO PER BONHUMORO

**SUBSTANTIVAJ SUFIKSOJ :**
**ISM - IST** (Difino P.V.)

---

**Kun substantivaj kaj verbaj radikoj**
(ĵurnalismo - protektismo) — (apotekisto - lingvisto - hejtisto).
**Kun aliaj radikoj** (absolutismo) — (saĝisto - komikisto - peristo).

**RIMARKOJ**

**I S M**

1) **kelkaj ism-vortoj** estas internaciaj radikoj : atavismo - imperialismo - turismo.
2) **oni montras la personon** per
— **LA RADIKO :** despoto - patrioto
— **per la sufiksoj :** IST - AN (ĉi - kaze ISM malaperas) anarkisto - turisto - vegetarano.

**I S T**

**Oni metas INO post IST**
amoristino - farmaciistino.



**Neism - emulo**

Por ne maljuniĝi oni devas iri kun sia tempo. Mi proponis al li, ke ni kune partoprenu je kelkaj diversaj ismoj : platonismo, spiritismo, vegetarismo, esperantismo, ĵurnalismo, kontestismo, plenaerismo, nudismo.

Ve ! li sentas intereson por nenio ; eĉ turismon li rifuzas.



**Despotismo**

Kompreneble, mi tute konsentas kun niaj sindikatoj pri sociaj postuloj kaj manifestacioj. Sed mi nepre estas kontraŭ striko ! Dum la striko-tagoj oni nur anstataŭas despoton kontraŭ alia despoto.



**Klereco**

Ho, Sinjorino, danku vian kleran kuraciston, kiu scias flegi ĉiujn viajn organojn ; kaj ankaŭ vian apotekiston, kiu povas havigi al vi le bezonatajn medikamentojn. Ne forgesu la vekhorloĝon ĉar vi devas gluti pilolojn je ĉiu horo dum la nokto. Ĝis revido, sinjorino ! Bonan sanon !

# Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (80 aŭstr. ŝil.).

**Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (160 fr.).

**Britujo** : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (2 pundoj).

**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (25 kr.).

**Finnlando** : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (16 mk).

**Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (10 mk.).

**Hispanujo** : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (240 pes.)

**Italio** : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 000 lires).

**Japanujo** : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 200 jenoj).

**Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (60 d.).

**Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (10 guld.).

**Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (24 kr.).

**Peruo** : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

**Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

**Rumanio** : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

**Sovetunio** : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

**Svedujo** : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (18 kr.).

**Svislando** : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (14 fr.).

**Tajlando** : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (5 us. dol.).

**Usono** : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (5 dol.).

**Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
**Maine-et-Loire**
FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

***Akceptas :***

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## *VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO*

**Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :**
**ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ** (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

*Supplément au n° 3-4 de 1975, de « KULTURAJ KAJEROJ »*

# LA VIE DE GRÉSILLON

## ENTRE NOUS...

Parlons tout d'abord de la salle de conférences. L'aménagement n'a guère avancé puisque le conseil d'administration avait décidé de le suspendre provisoirement. La tapisserie achetée n'a donc pas été posée car il y a des travaux préliminaires à faire ; ces travaux commenceront en septembre sans doute. Cependant il sera possible d'utiliser la salle car grâce à la « fonduso » mise spontanément sur pied par des stagiaires l'été dernier et qui s'est poursuivie pendant l'hiver, il a été possible d'acheter soixante chaises pliantes qui ont été livrées début juin. Nous espérons bien pouvoir acquérir le complément en 1976.

Les quelques passages qui ont eu lieu depuis le séjour de Pâques se sont bien déroulés et d'autres s'annoncent. Ils assurent un appoint financier intéressant mais malgré l'aide reçue d'amis fidèles il sera bien difficile de demander l'an prochain à une seule et même personne d'assurer des passages (certains de cinq jours) dont le nombre est incompatible avec toute vie familiale et professionnelle. Il faudra en réduire le nombre ou trouver une autre solution.

L'été s'annonce assez bon, sans doute meilleur que l'an dernier, quant au nombre des stagiaires tout au moins. Reste à savoir si les prix ne vont pas, comme les années dernières, prendre un nouvel essor entre juin et septembre.

Le conseil d'administration a dû entre autres choses, dans sa réunion du 22 juin, s'occuper déjà du programme de l'été 1976 et partager au plus vite les responsabilités.

P. BABIN

## ABONNES BIENFAITEURS

| | |
|---|---|
| M. Granier (38) | 20,00 |
| S-ro Schurad (All. Féd.) | 35,00 |
| M. Bricard (75) | 20,00 |
| Mme Cheverry (49) | 20,00 |
| Mr. Plutniak (62) | 20,00 |
| S-ro Necev (Bulg.) | 20,00 |
| S-ro Penny (G.-B.) | 20,00 |
| S-ro Tihanyi (Hong.) | 20,00 |
| S-ro Jenkins (Can.) | 20,00 |
| M. Bertin (76) | 20,00 |
| Mlle Loyant (56) | 50,00 |
| Mme Chagnoux (03) | 50,00 |
| M. Miquel (18) | 30,00 |
| M. Massé (13) | 20,00 |
| M. Diard (49) | 20,00 |
| M. Cachon (30) | 20,00 |
| M. Ringotte (59) | 20,00 |
| M. Buerick (62) | 30,00 |
| Mme Villette (49) | 50,00 |
| S-ro Torbell (Dan.) | 20,00 |
| S-ro Mikkelsen (Dan.) | 20,00 |
| S-ro Rasmussen (Dan.) | 20,00 |
| S-ro Steendahl (Dan.) | 20,00 |
| M. Capus (34) | 20,00 |
| Mlle Mauchien (80) | 20,00 |
| M. Thierry (75) | 20,00 |
| Mme Quillaud (44) | 20,00 |
| M. Hervé (49) | 20 00 |
| M. Jouvin (76) | 20,00 |
| Mme Chamarrier (69) | 20,00 |
| M. Musset (49) | 20,00 |
| M. Fauvel (22) | 20,00 |
| M. Durand (88) | 20,00 |
| Mme Lamarca (91) | 20,00 |
| S-ro W.-J. Ford (U.S.A.) | 20,00 |
| Mme Stuit (62) | 20.00 |
| Mme Marquis (35) | 20,00 |
| M. Vérot (42) | 20,00 |
| M. Epstein (39) | 20,00 |
| M. Massé (73) | 20,00 |
| Mme Leriche (29) | 50,00 |
| M. Esteban (83) | 20,00 |
| Mlle Blanc (58) | 20,00 |
| S-ro Guyot-Mateo (Belg.) | 20.00 |
| M. Flory (06) | 20,00 |
| M. Collin (92) | 20,00 |
| M. Trépier (74) | 20,00 |
| Mme Farjon (06) | 20,00 |
| M. Van Roye (Belg.) | 20,00 |
| M. Jolly-Demol (80) | 20,00 |
| M. Renard (51) | 20,00 |
| M. Verron (41) | 30,00 |
| Mlle Minault (79) | 20,00 |
| M. Rohrbach (Suisse) | 20,00 |
| M. Chevalier (44) | 20,00 |
| S-ro Weidacher (All. féd.) | 20,00 |
| **TOTAL** | **1.285,00** |

# ASSOCIATION CULTURELLE DU CHATEAU DE GRESILLON

Adhésion simple : **5,00 frs**
C.C.P. : 2512 17 Nantes

## LISTE DES DONATEURS

| | |
|---|---|
| Thibé | 123,19 |
| Pons (09) | 25,00 |
| Curnier (24) | 5,00 |
| Robert (13) | 5,00 |
| Bierhoff (R.F.A.) | 46,18 |
| Chasseriaud (17) | 55,00 |
| Bénazet (66) | 10,00 |
| Simonet (47) | 75,00 |
| Valreuse (48) | 10,00 |
| Vazon (70) | 100,00 |
| Julien (13) | 10,00 |
| Thiers - Esperanto (63) | 50,00 |
| Schortzes (67) | 10,00 |
| Amouroux (66) | 30,00 |
| Dieusaert (92) | 10,00 |
| Hum (84) | 10,00 |
| Granier (38) | 20,00 |
| Guillot (74) | 100,00 |
| Dehri (67) | 10,00 |
| **Total** | **704,37** |

## NOS JOIES

Nous apprenons avec plaisir le mariage de Dominique Despiney avec Barbara Zochowska. Tous nos vœux à Dominique et Barbara.

## NOS PEINES

D'Angers, nous apprenons le décès, à 86 ans, de Mlle Julia Nouais qui, au lendemain de la dernière guerre, prit une part active au regroupement des espérantistes angevins et à l'organisation des premières rencontres internationales en France. Elle fut, dès l'origine une amie de Grésillon. Ses nomberux amis espérantistes ne l'oublieront pas.

# RÉUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 22 JUIN 1975

La séance est ouverte à 10 heures. Le président Babin présente les excuses de Mlle Vazon, Mme Cheverry, MM. Bodereau, Coussé, Guillot.

Sont présents : Mmes Mathé, Micard, Jacquesson, MM. Babin, Bénistant, Boyer, Ciret, Dairon, Jacquesson, Jelenc.

M. Babin fait un bref rappel des stages qui ont eu lieu depuis Pâques :

— La rencontre des Universités Populaires a réuni 50 personnes pendant 4 jours avec le programme habituel.

— Le séjour Delaire a vu peu de participants, 10 en moyenne et 20 au maximum.

— Pendant une semaine, 20 enseignants qui avaient fait un stage d'un an dans une entreprise sont venus confronter leurs expériences.

— Stage de travail d'une journée d'un certain nombre d'inspecteurs de l'enseignement technique.

— Un passage scolaire de 2 jours d'un établissement d'Abbeville.

— Un autre de 3 jours d'une école de Ste-Marie-aux-Mines.

— Un bref passage de 50 enfants pour un repas seulement le jeudi 26.

Dans l'ensemble, les recettes ont été satisfaisantes pendant cette période.

## STAGES A VENIR

Le nombre des inscriptions s'annonce déjà plus grand que l'an dernier.

Pour la 1re période 110 participants sont prévus, ce qui occasionne quelques difficultés pour le logement.

— Pour la 2e période, il y a 50 inscriptions, et il y a aussi d'autres demandes en instance dont la moitié émane d'étrangers.

— Pour la 3e période, il y a 40 inscriptions.

— Différents passages sont prévus durant le mois d'août.

— La première période sera assurée du point de vue administration par M. et Mme Babin.

M. Mikulas conduira le 1er cours.
M. Lemagadure conduira le 2e cours.
M. Babin conduira le 3e cours.

Etant donné le nombre assez important d'enfants, il faudra sans doute prévoir un cours supplémentaire qui leur sera réservé exclusivement.

Les activités de loisir s'annoncent variées :
— paraboloïdes avec M. Fargeon ;
— vannerie avec Mme Lenel ;
— reliure avec M. Bénaïm ;
— émaux avec Mlle Déjean ;
— photo avec M. Lahaye.

M. et Mme Babin assureront l'administration de la deuxième période, pendant laquelle seront présentées des conférences aux thèmes très variés, mais en particulier sur la condition féminine dans le monde :
— Au Japon, par M. Grossman ;
— dans les pays de l'Islam, par M. Lloancy,

D'autres sujets seront traités par Mme Cheverry, MM. Babin, Boyet, Métivier, Mimo-Espinalt.

M. Bénaïm assurera un cours de reliure.

Mme Cheverry fera une initiation au tissage de sacs (macramé).

La troisième période sera administrée par M. et Mme Mathé.

Les 3 cours habituels seront conduits par Mlie Turbillon, MM. Boyet et Ribot.

M. Bourdelon guidera le cours de reliure, Mlle Turbillon la vannerie, Mme Boyet pourra assurer des activités diverses : perles, feutrine, etc.

Il est demandé quels manuels seront utilisés pendant les cours. M. Babin donne les précisions suivantes :

— 1re période : 2e cours Por la praktikantoj.
Cours audio-visuel.
3e cours Roman « Kredu min sinjorino ».
— 3e période : 1er cours Junulkurso.
2e cours Por la praktikantoj.
3e cours Atesto pri kapableco Marta.

M. Mathé fait remarquer que les charges retombent toujours sur les mêmes personnes, en l'occurrence M. et Mme Babin qui assurent tous les passages. Il propose que soit effectuée dès la rentrée une répartition des différentes tâches de façon plus équitable.

## TRAVAUX

Les travaux prévus n'ont pas pu être réalisés car la plupart des entrepreneurs n'ont pas respecté leurs engagements.

La tapisserie n'a pas été terminée dans les délais prévus.

Le circuit d'alimentation électrique du 1er étage a été, lui aussi, différé.

D'autres travaux sont à envisager, en particulier il faudra continuer l'installation des locaux sanitaires pour les campeurs : lavabos, W.-C., et prévoir une alimentation en eau par le puits qui se trouve devant la salle de reliure.

Déjà 60 chaises ont été achetées pour la salle de réunion.

## AFFAIRES DIVERSES

M. Babin porte à la connaissance du Conseil d'administration une lettre qu'il a récemment reçue. Elle émane de l'institution Hodler qui a décidé d'attribuer une somme de 500 florins hollandais pour l'achat de mobilier destiné à la salle de réunion.

— Personnel. Il est prévu un nombre suffisant, et le recrutement n'a pas posé de problèmes particuliers.

— Kulturaj Kajeroj. Depuis 1972, le règlement global des abonnements d'Espagne n'arrivait plus à Grésillon, et l'envoi avait été interrompu. Un certain nombre de réclamations ont permis de découvrir que la responsable, malade, avait négligé de retransmettre les abonnements qu'elle recevait. Le problème est maintenant en partie réglé. Le reliquat a été versé, mais il faudra faire l'envoi des journaux de plusieurs années.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 12 h. 30.

Le secrétaire de séance
G. Dairon

**NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :**

| | |
|---|---|
| Cartes postales de Grésillon : | |
| noires : | 0,50 F. |
| couleur : | 0,70 F. |
| Cuillères de collection : | 12,00 F. |
| Pendentifs : | 12,00 F. |
| Disques de stationnement : | 4,00 F. |
| Etoiles pour vitres de voitures : | 2,00 F. |

**Pensez à acheter :**

**FALSAJ AMIKOJ**

**en Esperanto**

de R. Bernard et A. Ribot

**3,50 F. (+ port : 4,45 F.)**

## NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

**Cours 1er degré.** — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

**Cours 2e degré.** — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

**Cours 3e degré.** — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

**VOUS POUVEZ COMMANDER**

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

**à M. CIRET**
route de la Boulerie
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

**MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE**

C.C.P. Nantes 1485-39

**Prix franco au-dessus de 15 Fr.**

Demandez notre catalogue

**Commandez-nous**

**LEXIQUE FONDAMENTAL**

**Esperanto - Français**

de Léger

6,50 F., port compris

**POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT**

Le livre qu'il vous faut :

**POR LA PRAKTIKANTOJ**
**de P. Babin**
Prix : **10,00 Fr.**